



“ Mi estas vicprezidanto de la LKK kaj krome respondecas pri la kongresejo. Mia teamo kaj mi laboras por ke la kongresejo plej eble bone servu la kongreson kaj ĝiajn partoprenantojn. Konsiderante la karakteron de la estonta kongresejo ni eble devas iom kreive plani, sed mi certas, ke la partoprenantoj povos ĝui varman, hejmeccan etoson en la kongresejo.”

**Päivi Saarinen**

“ Kiam mi aŭdis ke la UK okazos en Lahtio, mi sentis devon helpi, kvankam mi antaŭe ne aktivis en Esperantujo. Mi tamen kreskis en Lahtio, parolas Esperanton denaske kaj studis ĵurnalismon, do mi esperas ke kun ĉi tiuj scioj mi povas helpi aranĝi sukcesan kongreson.”

**Larissa Phileas**

“ La Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazos en Lahtio samtempe kun la UK-2019. La IKBE havas parte propran programon kaj mia tasko estas helpi kune kun la finna societo por vidhandikapitaj esperantistoj, STELETO, la aranĝoj dum ambaŭ kongresoj. Ĉar mi loĝas en Lahtio al mi certe venos multaj demandoj pri la vivo kaj vizitindaj lokoj tie, espereble mi povos kontribui por ke dum nia kongreso la partoprenantoj havu agrablajn spertojn, ne nur videblajn. Mi ŝatas naturon, silenton kaj pacajn diskutojn pri diversaj aferoj de la vivo, speciale el vidpunkto de daŭripova disvolviĝo. Pri sporto mi bedaŭrinde nenion scias! Mi partoprenis UK nur en Tamperejo 1995.”

**Börje Eriksson**

“ Mia naskiĝvilaĝo situas en la Lahti-regiono. Mi fariĝis esperantisto en Lahtio en la jaro 1987 kaj estas ekde tiam membro de UEA. Antaŭe mi laboris por la UK en Tamperejo 1995 kaj gvidis postkongresan ekskurson al Laponio. Ekde 2004 mi, post jaroj en aliaj urboj, denove loĝas konstante en Lahtio, konas bone la regionon kaj multajn lokajn homojn kaj eblojn.”

**Synnöve Mynttinen**

## Bonvenon al Lahtio!

### Eventoj

## Esperanto-semajno

#### ■ Ineke Emmelkamp

De la 26-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro en Prinsentuin en Leeuwarden (Frislando, Nederlando) okazis Esperanto-semajno. *Festi vian lingvon en libera ŝtato* – tio estas la elirpunkto de *Lân fan taal* (Lando de lingvo). En 2018 Leeuwarden estas la kultura ĉefurbo de Eŭropo. La lingva festivalo *Lân fan taal* estas grava parto de tio. Multaj institucioj kaj personoj en Frislando kaj (foraj) ĉirkaŭaĵoj kunlaboras por doni estontecon al plurlingveco. Vivigi lingvojn, ludi kun lingvoj kaj paroli ilin.

En la apuda ĝardeno estas grandegaj paneloj trilingvaj, ankaŭ en Esperanto. En Prinsentuin (Leeuwarden) estas konstruita speciala pavilono “MeM”, kio estas la hejmeccambo en la formo de du virinaj figuroj, kiuj reprezentas la du lingvojn: la frisan kaj la nederlandan. *Mem* estas la frisa

onomo por panjo. En “MeM” vi povas trinki kaj manĝeti ion, ĝi funkcias kiel publika restoracio.



Dum la tuta somero tridek lingvaj komunumoj prezentiĝas tie. Ankaŭ Esperanto. Dum nia semajno ni okazigis mallongajn Esperanto-kursojn kaj prezentojn por la vizitantoj de la “MeM”-pavilono.

7 tagojn ni prizorgis informbudon pri Esperanto sub la titolo *Tio kion vi delonge volis demandi pri Esperanto...* Dum la lundo vagadis tra la parko 2000 studentoj por ricevi informojn pri studenta vivo en Leeuwarden. Dum la lasta dimanĉo multaj homoj venis

al Prinsentuin por vidi kiuj teatraĵoj, muzikprezentoj, ludoj okazos en la venontaj monatoj. Estis bela vetero, do ni metis nian informbudon ekstere! Disdonis multajn informilojn.

Ni organizis tri sukcesplenajn koncertojn por ĉiuj, kiuj vizitis la “MeM”-pavilonon. Esperantistoj kaj neesperantistoj aŭskultis la muzikon de Kajto-kvarope, Radio Esperanto kaj Jonny M.

Dum du sabatmatenoj estis rekta elsendo de Omrop Fryslan, la tutprovinca radiokompanio. Unue estis intervjuo kun Ankie, Nanne kaj Andries. Ankie kaj Nanne, kiuj nun formas Kajton, faris prezenton dum la rekta elsendo. En la dua sabato estis intervjuo kun Yves Nevelsteen, Marc Konijnenberg kaj Jonny M, kiu prezentis sian muzikon.

